

# Svisa Esperanto-Societo

## informas

jaro 2013 numero 1-a: januaro-februaro 2013  
dissendo je la 10-a de januaro



Fotis Claude Gacond

**Ek al nova jaro !**

# Rememorigilo

## *SES informas*

### Redakcio :

Claude Gacond, Str. Chevreuils 14,  
CH-2300 La Chaux-de-Fonds  
Retpoŝto : gacond@bluewin.ch  
Tel. : hejme: 032 926 52 32  
ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:  
Nancy Fontannaz, Stefano Keller,  
Richard Schneller.

## Redaktaj datlimoj

2013-2 : marto-junio :  
**februare 10**, dissendo 1-an de marto.  
2013-3 : julio-oktobro :  
**julie 1**, dissendo 15-an de aŭgusto.  
2013-4 : novembro-decembro :  
**oktobre 10**, dissendo 1-an de novembro.  
2014-1 : januaro-februaro :  
**decembre 15**, dissendo 10-an de januaro.

## Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

## SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto, Grand-Rue  
9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18 88 kaj  
079 69 709 66.

Retpoŝto : [mirejo.mireille@gmail.com](mailto:mirejo.mireille@gmail.com)

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, Archstr.  
2, 8610 Uster. Tel.: 044 251 50 25. Retpoŝto :  
[info@esperanto.ch](mailto:info@esperanto.ch)

Marie-Louise Münger, Rue Centrale 4, 2112  
Môtiers. Tel. : 032 861 26 28.

Retpoŝto : [ml.munger@bluewin.ch](mailto:ml.munger@bluewin.ch)

Nelida Weidmann González, respondeca por  
familiaj renkontiĝoj kaj aktivecoj. Archstr. 2,  
8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25.

Komisiito pri financoj : Hans-Werner  
Grossmann, Esperanto-Servo, PF 262, 4132  
MuttENZ. Tel. : 076 460 89 92.

Retpoŝto: [esperanto-servo@bluewin.ch](mailto:esperanto-servo@bluewin.ch)

### *Kontonumero de SES (POSTFINANCE)*

**Svisa Esperanto-Societo**  
**2300 La Chaux-de-Fonds**  
**17-581908-4**  
(por kotizoj kaj donacoj)

**Konsultu la retejon de SES !**

[www.svisa-esperanto-societo.ch](http://www.svisa-esperanto-societo.ch)



# Vivo de SES

2013 januaro-marto - Redaktis Claude Gacond

## Pri la venonta Ĝenerala Asembleo 2013

La Ĝenerala Asembleo de SES okazos sabate la 23an de marto 2013  
**en Staat, oriente de Sankt Gallen**

Preciza rendevua loko :

**Hotelo Weisses Rössli**

**Hauptstrasse 69, 9422 Staat (SG). Tel: 071 855 15 15**

Ekde 10h00 : alveno, kafumado, babilado.

11h00 precize : Komenco de la Ĝenerala Asembleo.

12h30 : Komuna tag-manĝo antaŭmendenda.

### **Kultura programo** **Ĉe la Markthalle en Altenrhein**

Je la 15h00 ni ĝuos pri ĉiĉeronado tra tiu majstroverko : la **Markthalle** en **Altenrhein**. Temas pri bazaro-halo konstruita de la fama aŭstra artisto **Hundertwasser**. Tiurilate vidu fotojn tie :

<http://mirejo.blogspot.ch/2008/09/petit-voyage-en-suisse-alemanique.html>

La piedirado el la hotelo Weisses Rössli daŭras 10 minutojn laŭ ebena strato.

### **Konkurso**

Dum la vizito en la Markthalle ni havos la okulojn plenajn je viglaj koloroj. Pro tio SES organizas konkurson kun diversaj premioj. Temo :

Kiu venos al tiu evento vestita de **PLEJ BUNTAJ VESTOJ KUN VIGLAJ KOLOROJ ?**

Ĵurio decidus pri premioj : unua, dua, tria kaj lasta.

Anonco pri nia kunvena tago iros al Germana Esperanto-Asocio kaj Aŭstra Esperanto-Asocio, kun la espero, ke nia renkontiĝo estos internacia.

**Alveno** : la plej proksima publika transporto por atingi la Markthalle estas aviadilo kaj uzo de la flughaveno Altenrhein.

Tamen ankaŭ ekzistas busoj kaj trajno (linio Sankt Gallen - Rheineck - Sankt Margrethen) !

**Loĝado** : Ĉar la loko estas tute ne centra en Svislando, tial eblas tranokti en la hotelo Weisses Rössli en Staad kaj en la hotelo Hecht en Rheineck (tel 071 888 29 25) aŭ en aliaj tiaj establoj de la regiono.

La organizanto : Mireille Grosjean, kiu pretas respondi al eblaj demandoj.

-oOo-

## ***Svisa Esperanto-Societo*** ***Jarraporto pri la jaro 2012***

### **Membraro**

SES nombras 148 membrojn je la fino de la jaro 2012. Inter ili estas 10 junuloj. Malaperis 21 membroj pro malaliĝo aŭ ne-repago de kotizo. 10 novaj membroj aliĝis. Ni bonvenigas ilin. Honoraj membroj de SES estas du : Lucienne Dovat kaj Claude Gacond.

### **Financoj**

11 personoj fariĝis patronoj de SES pagante la duoblon de la normala kotizo. Entute nun estas 7 dumvivaj membroj de SES.

Mirinde alta estas la suma donacaro dum 2012 : pli ol Fr 1300. Niaj membroj estas malavaraj kaj deziras helpi al niaj aktivecoj. Ni ege dankas al ili.

Nia komisiito pri financoj Hans-Werner Grossmann daŭre plej efike zorgas pri niaj financoj kaj nia adresaro. Ni dankas lin elkore pro lia regula kaj efika laboro.

### **Aktivecoj**

La **estraro** kunvenis la 25an de februaro en Bielo kaj la 3an de decembro en Uster (ZH) kaj Môtiers (NE) per Skajpo. La 3an de decembro la estraro ricevis anoncon pri la demisio de Stefano Keller el lia posteno de sekretario de SES.

La 28an de aprilo okazis **ĝenerala kunveno de SES** en Vevey (VD). Partoprenis kvindekda personoj. Vigla debato okazis en pozitiva etoso.

Paralele al tiu evento okazis **ekspozicio** pri Esperanto en Vevey en *Magasin du Monde*. Konceptis ĝin Sonia Daubercies kaj Charlotte Blanc Maillard. Laŭ tute nova luda maniero la ekspozicio montras famulojn kaj citaĵojn de ili en Esperanto. La vizitantoj ricevis tiujn citaĵojn en la franca lingvo kaj devis parigi la tekstojn, do iom malkovras Esperanton. Inter la famuloj aperas du papoj, Léon Tolstoï, Albert Jacquard, Lumière, Gustave Eiffel kaj multaj aliaj, entute 22. Tiu ekspozicio povas migri al aliaj lokoj, bonvolu anonci pretecon gastigi ĝin en adekvata loko en via loĝurbo. Nun la citaĵoj ekzistas ankaŭ en la germana kaj en la turka. Jam la ekspozicio staris en Berno en la restoracio « Esperanto », Winkelriedstrasse 42.

Sub la aŭspicio de Svisa Esperanto-Societo (SES) kaj de Svisa ILEI-Sekcio (SIS), CDELI organizas **studsabatojn** ĝenerale ĉiun trian sabaton de la monato, kiuj estas plej bona okazo por lerni la lingvon kaj/aŭ progresi, ĉefe por aŭdi la lingvon, paroli ĝin kaj profiti je ĉeesta instruado. Fidele kunvenas proksimume deko da gesamideanoj. Komuna tagmanĝo arigas la gestudentojn kaj aliajn surlokajn esperantistojn en varma etoso. Instruas tie ĉefe Monika Molnar kaj Nancy Fontannaz, kaj ankaŭ Stefano Keller, Luko Allemant kaj Nicole Margot. Danielle Carrier helpas en la organizado. La SES-estraro varme dankas ilin. Ĉiuj klarigoj aperas sur : <http://www.cdeli.org/samedis/>

**CDELI** estas ne nur **arkivejo**, sed ankaŭ multe pli. Ĝi estas **kursejo**, vidu supre pri la studsabatoj. En CDELI ankaŭ eblas **aĉeti librojn**, lernolibrojn, vortarojn, k.s. CDELI estas nia libroservo. Preskaŭ ĉiutage deĵoras tie Claude Gacond, la arkivisto kun la kunlaboro de la bibliotekistino Martine Schneller. Ilin helpas Sonia Béatrix, Danielle Carrier, Nancy Fontannaz, Andrée Gacond, Richard Schneller kaj Stefano Keller, kiu zorgas pri la retejo de la Asocio de la Amikoj de CDELI, [www.cdeli.org](http://www.cdeli.org). Gratulon kaj dankon al ili.

Danke al la kontaktoj de Mireille Grosjean en Japanio, la kolekto de *La Revuo Orienta*, la oficiala organo de Japana Esperanto Instituto, povis esti iom kompletigita.

Sub la aŭspicio de Svisa Esperanto-Societo okazis **festoj** por celebri la **125an** datrevenon de la aperigo de la *Unua Libro*. Tiu evento okazis en La Chaux-de-Fonds la unuan de septembro organizita de Claude Gacond. Matene en CDELI prelegis D-ro Christoph Klawe el Trier (Germanio) kaj Dominique de Mestral. Posttagmeze en la urba muziklernejo okazis en la belega salono Charles Faller koncerto de la Svisa Esperanto Koruso, disdono de KER-diplomoj pri lingvokapablo kaj teatraĵo de la lernantoj de la Granda Ursino, privata lernejo en La Chaux-de-Fonds, kie ĉiuj infanoj lernas Esperanton. Tiu evento estis digna festado de la 125a jariĝo de nia lingvo.

Okazis la dua **postsomera renkontiĝo** en Soloturno la 8an de septembro. La dekkvin migremuloj uzis trajnon al Oberdorf kaj promenis ĝis loko, kie vidiĝas dinosaŭraj spuroj. Poste la grupo revenis al Soloturno kaj veturis per ŝipo al Bielo. Trihora ŝipveturado ebligis agrablan babiladon. Organizis la tagon Mireille Grosjean. Feliĉe estis belega vetero.

Sub la aŭspicio de SES okazis **SFERO Svisa Feria Esperanta Renkontiĝo** en Le Louverain, super Les Geneveys-sur-Coffrane (NE). Samtempe kaj sub sama tegmento okazis renkontiĝo kadre de la projekto Grundtvig, pli ol dudek personoj venis por ĝi el Germanio, Francio kaj Katalunio. Pluraj aktivecoj estis komunaj por SFER-anoj kaj Grundtvig-anoj. Gaja etoso, infanaj babiladoj de niaj kelkaj denaskuloj, muziko de la junularo, belega vetero : ĉiuj reiris hejmen tre kontentaj kaj feliĉaj.

<http://www.svisa-esperanto-societo.ch/sfero/>

<http://www.esperanto.ch/sfero/generalj%20informoj.html>



### **Informado al la ekstera mondo :**

Gazetaraj komunikoj. Laŭbezone Mireille Grosjean sendas rapide gazetaran komunikon per la Reto. Paralele Dietrich Weidmann agadas en Germanio. Ankaŭ la sekretario Stefano Keller same agadas.

Por vastskale informi la publikon pri la studsabatoj de CDELI Mireille Grosjean, kunlabore kun Stefano Keller, Nancy Fontannaz kaj Claude Gacond, kreis afiŝojn kaj metis ilin, respektive sendis ilin tra la kantono de Neuchâtel ĝis Delémont, Saint-Imier, do al najbaraj lokoj. Rezulto de tiu informado al publiko vidiĝas.

Alia maniero informi estas meti en la telefonlibron linion pri Esperanto. Tion oni povas fari nur en la telefonlibro de sia loĝloko. Mireille Grosjean faris tion en la telefonlibro numero 4 por la urboj Le Locle, La Chaux-de-Fonds kaj Neuchâtel kaj sia vilaĝo Les Brenets. Unu anonco kostas jare iom pli ol Fr 20.- Bonvolu pripensi pri sama agado en via regiono. Ne forgesu meti la vorton ESPERANTO en majuskloj.

### **Laste aperis :**

Pluraj radiomencioj pri SFERO kaj GRUNDTVIG en oktobro 2012 ĉe loka radiostacio RTN.

Unu okminuta filmo pri la du samaj eventoj ĉe loka televidstacio Canal Alpha. Ambaŭ estis tre bone dokumentitaj kaj pozitivaj. Ambaŭ estas rezulto de gazetara komunikado pri SFERO farita de Mireille Grosjean. Stefano Keller enretigis la videon : <http://www.svisa-esperanto-societo.ch/sfero/>

Ĵurnalisti de *Neue Zürcher Zeitung* venis al Studsabato la 17an de novembro. Artikolo aperis en la rubriko « Zu Gast » la 31an de decembro.

### **Interna informado al niaj movadanoj :**

Nia organo *SES informas* aperis kvarfoje dum la jaro kun valoraj informoj ne nur pri la vivo de la societo, sed ankaŭ kun kultura enhavo. Bedaŭrinda paneo okazis komence de la jaro 2012. Ni elkore dankas al la redaktoroj Claude Gacond, Richard Schneller, Nancy Fontannaz kaj Stefano Keller, kaj al la enkovertiganto André Sandoz. Bonvolu vidi <http://www.svisa-esperanto-societo.ch/SESi/>

### **Retejo**

SES havas retejon [www.svisa-esperanto-societo.ch](http://www.svisa-esperanto-societo.ch)

Tiu retejo estas prizorgata de Stefano Keller.

Plie Luc Allemand akceptis la taskon « nutri » la retejon regule pri okazontaĵoj. Bonvolu legi la paĝon [www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro](http://www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro). Luko laboras bonege kaj akurate. Ni ege dankas al ili.

### **Retlisto « svislando »**

Estas je nia dispono retlisto. Per ĝi ni povas rapide anonci ion. Nova prizorgado de tiu listo venos.

## **Retejo « LERNU »**

520 personoj studas Esperanton per tiu retejo (2012-11-02) en Svislando. Danke al la afabla kunlaboro de la teamo de « lernu », oni nun vidas la nomojn de tiuj, kiuj vere loĝas en Svislando ; antaŭe aperis kelkaj ĉinoj, kiuj elektis CH anstataŭ CN kaj kelkaj ĉilianoj, kiuj elektis CH anstataŭ CL... Ekzistas la eblo ekrilati kun ili tra **lernu** mem. Tion Mireille Grosjean faris en februaro kaj en oktobro por anonci la datojn de la studsabatoj en CDELI. Atentan notadon de la kontaktoj ŝi faras. Intenco estas rilati regule, tamen ne tro ofte, por flegi la kontakton, informi pri okazontaĵoj kaj altiri tiujn studentojn al iuj renkontiĝoj.

Pri tiu elstara retejo por studi memstare kaj senpage nian lingvon : [www.lernu.net](http://www.lernu.net)

## **Pasporta servo**

Tiu mirinda reto ekzistas nun kaj papere kaj rete. Luc Allemand fariĝis oficiala svisa peranto. En Svislando 10 personoj pretas gastigi vojaĝantojn.

Bv vidi [www.pasportaservo.org](http://www.pasportaservo.org).

## **Lokaj kaj fakaj grupoj**

Lokaj kaj fakaj grupoj aktive kunvenadas kaj havas sian propran vivon ie kaj tie en Svislando. Por scii pri tio, kaze ke vi vojaĝadas en nia landeto, vidu nian organon *SES informas* kaj nian retpaĝon. La estraro arde petas la lokajn grupojn anonci siajn aktivecojn tra : [www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro](http://www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro)

La estraro de SES estas tre feliĉa pri tiu bunta agado tra Svislando kaj gratulas kaj dankas la lokajn organizantojn.

SES subtenas finance iun tutnacian kunvenon. Se vi havas intencon organizi tian kunvenon, bonvolu turni vin al la estraro de SES, por ke la buĝeto povu esti redaktita adekvate.

SFERO ekzemple ricevas subtenon de SES. Temas pri tutsvisa / internacia kunveno de esperantoparolantaj familioj, tamen multaj aliaj personoj aliĝas kaj la grupo vigle komunikas esperante kaj ludas, kantas, migras. En 2012 SFERO okazis en Les Geneveys sur Coffrane (NE) en iom multekosta loko; SES estraro decidis pagi parton de la kotizoj de familioj. Dankon al la organizantoj de la programo : Marion Bélisle kaj Veronika Pochanke. Pri SFERO legu supre.

Mireille Grosjean kaj ŝia filino Marion Bélisle fondis GELB : *Groupe Espéranto Les Brenets*, kaj SEL : *Société Espéranto Le Locle*. Tiaj modestaj stabloj aperos en la oficialaj dokumentoj de la loko, do tio efikas informcele.

## **Junularo (JES)**

La arkivoj de JES estis translokitaj el la domo de iama prezidanto Laurent Burgbacher al la domo de Mireille Grosjean en Les Brenets. Al ŝia poŝtfolio alvenas poŝtaĵoj por JES same al Les Brenets.

## **Universala Esperanto Asocio (UEA)**

SES estas landa sekcio de UEA. La ligoj estas tre regulaj. Mireille Grosjean reprezentas SES-n ene de la komitato de UEA ekde 1998. Dum la UK 2012 en Hanojo (Vjetnamio) ŝi partoprenis la komitatkunsidojn. Stefano Keller kiel estrarano de UEA agadas ene de UEA. En Hanojo kongresis 6 svisoj.

Estas en Svislando 19 delegitoj laŭ la Jarlibro de UEA 2012. Nia ĉefdelegito estas François Randin en Lausanne.

Pri UEA vidu [www.uea.org](http://www.uea.org)

## **Sennacia Asocio Tutmonda (SAT)**

Estas en Svislando 7 membroj de SAT. Richard Schneller respondecas pri SAT en nia lando.

Estas en Svislando 3 membroj de SAT-Amikaro. Mireille Grosjean respondecas pri SAT-Amikaro en nia lando.

Pri SAT kaj SAT-Amikaro vidu [www.esperanto-sat.info](http://www.esperanto-sat.info).

## **Unuiĝintaj Nacioj (UN) en Ĝenevo**

UN havas sian ĉefan eŭropan sidejon en Ĝenevo. Pro tio UEA bezonas surlokajn homojn por zorgi pri kontaktoj inter tiuj du instancoj, ĉar UEA estas Ne-Registara Organizo (NRO) agnoskita de UN. Ekde 2008 laboris tie Stefano Keller, Dietrich Weidmann, Nicole Margot, Mireille Grosjean, Cesco Reale, Charmian Common, Adrian Tanner, Verena Graf.

Bonvolu vidi [www.lingvaj-rajtoj.org](http://www.lingvaj-rajtoj.org)

## **Internaciaj kontaktoj**

Private multaj el niaj membroj vojaĝas al UK-oj kaj al aliaj landoj. Ofte ili raportas en lokaj kluboj. Ofte ili ankaŭ raportas en *SES informas*. Ni tre dankas pro tiuj valoraj raportoj, kiuj interesas multajn el ni kaj ĉefe tiujn, kiuj ne povas vojaĝi al kongresoj kaj renkontiĝoj.

## **Projekto Grundtvig**

Komence de la jaro 2011 la estraro jesis pri propono partopreni la Grundtvig-projekton. Tiu strukturo nestas ĉe Eŭropa Unio, tamen Svislando rajtas partopreni. Svislando eĉ ricevis gvidan rolon. La temo de la kunvenoj estas « interkultura edukado, defio por Eŭropo » kaj rilatas al plenkreskuloj. Lukto kontraŭ rasismo, kontraŭ iuj diskriminacioj, harmonia kunvivado, jen nia labortemo. La projekto daŭros ĝis somero 2013. La unua renkontiĝo okazis dum SFERO en oktobro 2011 en Richterswil (ZH). Poste sekvis Bonn, Germanio, Bouresse (Francio), Canet-de-Mar (Katalunio) kaj denove Svislando dum SFERO en oktobro 2012. La vojaĝkostoj al eksterlando estas pagitaj pere de EU-mono. Grava renkontiĝo okazos dum majo 2013 en Artigues apud Bordeaux (Francio). Plia kunveno en Katalunio estas planita. Bonvolu anonci vin ĉe Mireille Grosjean, via vojaĝo estos repagita.

Kadre de tiu projekto okazadas renkontiĝoj en Soloturno kun la gvidantoj de ĉiuj tiaj projektoj en Svislando, proksimume 30. En tiuj grupoj la teamoj havas



gigantajn problemojn pri komunikado ; Mireille Grosjean povis plurfoje raporti publike pri nia solvo : uzo de Esperanto. Ĉiuj miris kaj envias nin.

Bonvolu malkovri la laboron en rilato kun tiu projekto : [www.noos.ch/ideo](http://www.noos.ch/ideo)

Pri Grundtvig ĝenerale bv iri al [www.ch-go.ch](http://www.ch-go.ch)

## **Diversaĵoj**

La kun-prezidanto de SES Mireille Grosjean plu nomadumas tra la mondo. Okazis diversaj prelegoj ŝiaj (ŝi havas 33 preleg-titolojn) en diversaj lokoj kaj en Svislando, kaj en Pollando, Francio, Aŭstrio, kaj en Azio (Japanio, Ĉinio, Vjetnamio, Nepalo), kie ŝi restadis dum kvar monatoj, kaj en Afriko (Benino kaj Senegalo), ĉu en lokaj Esperanto-kluboj, ĉu kadre de ekstermovadaj prezentoj.

Alian taskon ŝi prenis : ŝi fariĝis komisiito de ILEI por helpi al kandidatiĝo de novaj ILEI-sekcioj, al preparo de aliĝpetoj.

Ŝi estas membro de Franca Esperanto-Instituto (FEI) kaj pro tio iras unufoje jare al Parizo por kunsidi.

Kiel kun-prezidanto de Svisa Asocio de Edukistoj al la Paco ŝi lanĉis la ideon de tutsvisa kolokvo pri tiu temo. Vigla laboro okazis ene de la Organiza Komitato, kie agadis reprezentantoj de *Schw. Friedensrat – Conseil suisse de la Paix, Mouvement international de la Réconciliation* MIR-IFOR, CENAC en Lausanne kaj aliaj. La kolokvo okazis la 27an kaj 28an de oktobro 2012 en Friedensdorf – *Village de la Paix* en Broc (FR) kaj vidiĝis tie stando pri Esperanto. Ŝi povis klarigi publike, ke pro sia regula laboro mondscale ŝi bedaŭras la mankantajn kontaktojn inter la svisaj etnoj kaj pro tio iniciatis la kolokvon. Adrian Tanner, juna interpretisto kaj esperantisto, volontule partoprenis por interpreti (per samtempa interpretado). Vidu [www.asepaix.ch](http://www.asepaix.ch)

Kunlabore kun Dr Christoph Klawe el Germanio Mireille Grosjean nun aktivigas por konigi aikido-n al esperantistoj kaj konigi esperanton al aikido-praktikantoj.

Nova faka asocio naskiĝos.

Pri aikido bonvolu legi <http://eo.wikipedia.org/wiki/Aikido>

<http://mirejo3.blogspot.ch/2012/10/aikido.html>

Pli pri la migradoj kaj pripensoj de Mireille Grosjean :

<http://mirejo3.blogspot.com>

## **Konklude**

Legante tiun raporton vi povis konstati, ke multaj diversaj personoj agadas en Svislando kaj transprenas taskon, kiu rilatas al iliaj kapablo, emo, eblo. Tio estas tre pozitiva fakto. La estraro de SES elkore dankas al ili. Tio estas signo de sana vigla movado.

Neuchâtel. 2012-12-04.

Nome de la estraro de SES : Mireille Grosjean kaj Dietrich Weidmann.

-oOo-

## *Estrarkunsido de SES*

Interreta kunsido tra Skajpo, 2012-12-03, 14h00 kun partopreno de Mireille Grosjean (MG) kaj Marie-Louise Münger (MM) en Môtiers (NE) kaj Nelida Weidmann (NW) kaj Dietrich Weidmann (DW) en Uster (ZH).

### **TAGORDO**

#### **1. Saluto, aprobo pri la tagordo, decido pri la protokolado :**

La tagordo estas aprobita post aldono de 3 punktoj fare de MG (13, 14 kaj parto de la punkto 9). NW protokolas kune kun MG.

#### **2. Venontaj eventoj kaj kunvenoj :**

Jaŭde 21-an de marto 2013 : MG prelegos pri Esperanto en Staad (SG).

Sabate 23-an de marto en Staad (SG) : Ĝenerala kunveno de SES kun poste vizito de Markthalle en Altenrhein.

De vendrede 29-a de marto ĝis marde 2-a de aprilo 2013 : SAT-Amikara Kongreso tute proksime de Svislando en Francio. MG verkos pri tiu SAT-Amikara Kongreso en Metabief por *SES informas*. Tio devos esti vaste anoncita en Svislando.

En julio : ILEI-Konferenco en Herzberg, Germanio, poste UK en Rejkjaviko (Islando).

Sabate 31-an de aŭgusto : Postsomera kunveno : Vizito de la Muzeo Robert en Bielo kaj ŝipveturado al la Insulo Sankta Petro.

2014 : Ĝenerala Asembleo de SES. MG intencas rezervi kunvenejon en Yverdon kaj organizi viziton al la Spaco pri Jules Verne en "*Maison d'Ailleurs*". Najbaraj francoj intencas partopreni.

Decido pri la estrarkunsidoj : Ni klopodu ĉiun duan monaton fari kunsidon de la SES-estraro tra Skajpo. 1<sup>a</sup> 8-a semajno de la jaro. 2<sup>a</sup> 16-a semajno de la jaro. 3<sup>a</sup> 24-a semajno de la jaro. Ni konsideru, ke tia labormaniero ŝparas vojaĝkostojn por SES kaj tempon por la estraranoj.

#### **3. Jarraporto 2012 kaj buĝeto 2013 :**

La Jarraporto 2012 estas akceptita.

Pri akcepto de buĝeto, vidu la punkton 15.

#### **4. Presado de informiloj :**

MG demandas en la Ĝenerala Asembleo, kiom da informiloj bezonas la membroj, kiuj deziras disdoni ilin.

Ni profitu de la informiloj de Italio, Germanio kaj Francio, aĉetante ĉe ili anstataŭ mem verki.

MG jam mendis en Francio, pri Germanio ni atendas novan presadon kun ĝustaj indikoj pri Svislando kaj poste ni mendos.

## **5. Laboro kaj konsisto de la estraro :**

Ni ĵus eksciis pri la ĵusa demisio de la secretario Stefano Keller. Por la financoj ni havas komisiiton, Hans-Werner Grossmann. Li laboras tre efike kaj akurate. Li petis, ke ni esploru pri nova kasisto. Tamen li pretas plu librotendi ĝis ni trovos la novan.

La nuna estraro esploros pri novaj kasisto kaj secretario.

La nova kasisto povas esti ĉu membro de la estraro, ĉu komisiito ne-membro de la estraro.

## **6. Nuligo de kontoj Postfinance :**

La konto “*vaste kaj digne*” estas nuligita. Ĝi restis sub mil frankoj, do pro tio altaj taksoj pagendas. Hans Grossman ĝiris la restantan monon al la ĉefa konto.

## **7. Vendataj libroj : *Fest-libro Gacond* kaj *Enciklopedio* :**

Ni esploros pri tio. Ni favoras grandan prez-redukton por la *Enciklopedio*, por ke la libro estu bone uzata, vendata, aĉetata, donacata. Anonco en *SES informas* pri la *Enciklopedio* kaj pri la *Fest-libro Gacond* kun prezoj. MG verkos informon pri la libroj kaj prezoj por *SES informas*. MG informiĝos ĉe CDELI pri la restanta kvanto.

Vidu artikolon ĉi-rilatan en *SES informas*.

## **8. *SES informas* :**

Ni devos esplori pri homo, kiu pretos transpreni la redaktadon *Esperanto-aktiveco en Svislando*, ĉar Stefano Keller ankaŭ demisiis de tiu posteno.

## **9. Kiu faras kion en Svislando?**

Venis sugesto de la UEA-komisiito pri ĝemelaj urboj, ke ĉiu Landa Asocio havu personon, kiu okupiĝu pri ĝemelaj urboj. La SES-estraro favoras kaj esploras pri persono. MG skribos artikolon pri tio.

Ni konsciiĝas, ke ni devas plibonigi nian retejon [www.svisa-esperanto-societo.ch](http://www.svisa-esperanto-societo.ch).

## **10. Kio aperu en nia kalendaro sur la retejo de SES ?**

Post diskuto venas jena decido :

- Ĉiuj eventoj organizitaj de SES.
- Ĉiuj eventoj, kiuj okazas sub la aŭspicioj de SES.
- Ĉiuj eventoj organizitaj de svisaj lokaj grupoj.
- Ĉiuj eventoj mondscale gravaj : UK (Universalaj Kongresoj), ILEI-Konferencoj (Internacia Ligo de Esperantaj Instruistoj), SAT-Kongresoj (Sennacieca Asocio Tutmonda).
- Ĉiuj eventoj, kiuj okazas proksime de Svislando.
- Ĉiuj eventoj, en kiuj kutime multaj svisoj partoprenas.

## **11. Ĉu varbkampanjo por akiri novajn membrojn por SES ? por UEA ? por ILEI ?**

Temas pri daŭra pripensenda afero, pri kio ni denove diskutos en alia okazo.

## **12. Kiam kaj kie okazos la venonta estrarkunsido ?**

Decido: Ni klopodu ĉiun duan monaton fari kunsidon de la SES-estraro tra Skajpo.

Por la komenco de 2013 : La 8-a semajno de la jaro; la 16-a semajno de la jaro; la 24-a semajno de la jaro. Fizike la estraro kunvenu dum Ĝenerala Asembleo kaj dum SFERO.

## **13. Sekvo de la inaŭguro de la ekspozicio pri Esperanto en Berno :**

Tie partoprenis Gabriel Marchon, Ueli Haenni, Sonia Daubercies, Benno Frauchiger, Mireille Grosjean kaj aliaj gastoj. Inter la gastoj S-ro Narcisse Niclass, redaktisto de revuo.

- Ni acceptas la proponon de S-ro Narcisse Niclass, redaktisto de la *Revue de l'Innovation et de l'Invention en Romandie* [www.invention.ch](http://www.invention.ch), MG verkos la artikolon en decembro. Li petas kunfinancadon de la eldono de unu paĝo en la revuo, sumo por SES en alteco de Fr 1800.- . Tio inkluzivas tablon dum 4 tagoj en "Salon des Inventeurs" en Ĝenevo de la 10<sup>a</sup> ĝis la 14<sup>a</sup> de aprilo 2013.

- Eldono de la 22 paneloj de Sonja Daubercies en formato de poŝtkarto estas esplorenda kampo.

## **14. Afrika kongreso de Esperanto :**

La Ne Registara Organizo "Scio Sen Bariloj" (SSB) organizos tiun kongreson kun la helpo de la nordaj Landaj Asocioj. SES ricevis informojn pri tiu evento. MG (membro de SSB) proponas, ke oni prenu Fr. 5000.- por subvencii la alvenon de du afrikanoj en Kotonuo (Benino), kie la Kongreso okazos. SES alvokos la membraron donaci por tiu celo kaj eventualan diferencon pagos SES el la ĝenerala konto. Oni metu tiun monon en la buĝeton kaj diskutu pri tiu sumo en la Ĝenerala Kunveno dum diskuto pri la buĝeto.

Vidu artikolon ĉi-rilatan en *SES informas*.

## **15. Buĝeto :**

Sub cifero 3020 (subvencioj kaj premioj) estu Fr 3000.-, de kiu Fr 2000.- iru al fonduso 2014 (Vasta informkampanjo sub formo de kantokonkurso kadre de SFERO). Oni samtempe alvoku al malavaraj donacontoj por tiu fonduso.

Buĝeto kun aldonoj rilataj al la hodiaŭa kunsido estas akceptita.

Fino de la kunsido je la 16.30 horo.

-oOo-

## **KOTONA GAZETO 2012-11-21 numero 1 5-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE)**

La 11an de novembro 2012, okaze de ekzamensesio de ILEI/ UEA, kunvenis en Kotonuo (Benino) Adjé Adjévi el Lomé (Togolando) - kunordiganto de Afrika Komisiono (AK) de UEA, Privas Tchikpe el Kotonuo - prezidanto de *Scio Sen Bariloj* (SSB) kaj Mireille Grosjean - membro de SSB. Plie partoprenis Latifou

Gbadamassi el Lokossa (Benino) - prezidanto de Asocio de Beninaj Esperantistoj (ABeE).

**Faktoj :** Okazadas Tutamerika Kongreso de Esperanto kaj Azia Kongreso de KAEM.

**Demando :** Kial ne okazigi tutafrikan kongreson? Tia evento endas, nepras, eblas.

**SSB pretas organizi tian kongreson en kunlaboro kun Afrika Komisiono (AK) de UEA kaj Asocio de Beninaj Esperantistoj (ABeE).**

**Datoj kaj loko : De la 29a de decembro 2013 ĝis la 4a de januaro 2014 en Kotonuo (Benino).**

**Celoj :** Ebligi - Kunvenon de minimume po unu persono el ĉiuj 17 afrikaj landaj asocioj (LA) de UEA. - Kunvenon (fizikan) de Afrika Komisiono. - Kunvenon de esperantistoj el la tuta mondo kun afrikanoj. - Al la beninaj komencantoj rilati kun eksterlandanoj, nutri ilian motivigon en la lernado de Esperanto. - Al ne beninanoj viziti Beninon kaj konatiĝi kun ĝia riĉaspekta kulturo (Porto Novo, Abomejo-Abomey, Ouidah, Ganvié).

### **Partnerado**

Pro la fakto, ke malmulte da afrikanoj povos mem pagi flugon aŭ bus-veturadon al Kotonuo, SSB lanĉas jenan strategion :

Unu LA (Landa Asocio) el la “nordo” (inkluzive Aŭstralio kaj Novzelando) subtenas finance la vojaĝon kaj restadon de unu aŭ pluraj membroj de unu LA en Afriko. Se eblas, tiu norda LA sendas minimume unu membron por ebligi konatiĝon. Ne nur la LA povas anonci sin por partneriĝi kun afrika LA, sed ankaŭ lokaj kluboj aŭ federacioj, kiel la Rodan-alpa Federacio en Francio. Kompreneble jam ekzistantaj kontaktoj inter la nordo kaj la sudo povus enkadriĝi en tiu strategio.

**LKK konsistas el :** Prezidanto : Privas Tchikpe ; Membroj : Adjé Adjévi, Mireille Grosjean, Latifou Gbadamassi. Aliaj membroj ne decidpovaj aldoniĝos.

Pri *Scio Sen Bariloj* vidu en :

[eo.wikipedia.org](http://eo.wikipedia.org)

[http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Scio\\_Sen\\_Bariloj&stable=0](http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Scio_Sen_Bariloj&stable=0)

Kotonuo, la 12an de novembro 2012.

Privas Tchikpe, Adjé Adjévi kaj Mireille Grosjean.

-oOo-

**Dum la Estrarkunsido de SES de la 3a de decembro 2012 venis jena decido pri tiu projekto :**

La Ne Registara Organizo *Scio Sen Bariloj* (SSB) organizos tiun kongreson kun la helpo de la nordaj Landaj Asocioj. SES ricevis informojn pri tiu evento.

Mireille Grosjean (membro de SSB) proponas, ke oni prenu Fr. 5000.- por subvencii la alvenon de du afrikanoj en Kotonuo (Benino), kie la Kongreso okazos. SES alvokas sian membraron donaci por tiu celo kaj eventualan diferencon pagos SES el sia ĝenerala konto. Oni metu tiun monon en la buĝeton kaj diskutu pri tiu sumo en la Ĝenerala Kunveno dum diskuto pri la buĝeto.

-oOo-

## **SES serĉas novan sekretarion**

Karaj kaj estimataj membroj de Svisa Esperanto-Societo,

Ekde decembro 2012, per mia demisio el la sekretaria funkcio en la Estraro de Svisa Esperanto-Societo, liberiĝas tiu rolo por alia aktivemulo. Ankaŭ la taskon de kunredaktoro pri la paĝoj «Vivo de SES» en *SES-informas* mi deziras transdoni al iu alia.

Tamen mi daŭre restos aktiva membro de Svisa Esperanto-Societo, partoprenos kaj subtenos ties vivon (ĉu loke, ĉu landnivele, ĉu rete) laŭeble plej aktive, kiel simpla membro, kaj pluzorgos pri la retejo de nia Societo. Ankaŭ la retliston «[svislando@yahoogroups.com](mailto:svislando@yahoogroups.com)» mi volonte plue administros, mastrumos.

Mi kore dankas la membraron de SES por ties ĝisnuna fido en mi kaj bondeziras al la daŭrigonto. Kompreneble, mi estos je dispono por la transdono de informoj pri tiuj taskoj.

Samideane kaj kunlaboreme,  
Stefano Keller

## **SAT-Amikaro-Kongreso tute proksime de Svislando**

En Métabief, proksime de Vallorbe (VD), okazos SAT-Amikaro-Kongreso je Pasko 2013, de vendredo la 29a de marto ĝis mardo la 2a de aprilo. La organizanto estas la kun-prezidanto de SES Mireille Grosjean. La kongresa temo estas LIMOJ. Tre riĉa kultura programo estas survoje al realiĝo, kun inter aliaj valoraj eroj la koruso Interkant' kun prezento de Carmen de Bizet (adaptita prezento parte en Esperanto, kun koruso, solistoj kaj dancistoj). La Tuttaga Trilanda Translimado (TTT) ebligos viziton al Francio, Svislando kaj *République du Saugerais*, kie ni ĝuos akcepton de la Prezidanto de la Respubliko ! Kutime partoprenas inter cent kaj centkvindek personoj el tuta Francio kaj el eksterlando. Svisoj uzu tiun eblon partopreni !

-oOo-



**Pri la venontaj studsabatoj en CDELI  
Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds**

Strato Progrès 33, 2303 La Chaux-de-Fonds.  
Buso N° 4 direkto Hôpital, haltejo Bibliothèque.


Jen la datoj de la venontaj studsabatoj : januare 26, februare 16, marte 16, aprile 20, majo 25 kaj junio 15.

Formiĝas 3 studrondoj laŭ la lingvo-niveletoj : tutkomencantoj, mezuloj kaj lertuloj. Partoprenkontribuo : Fr 15.- (senpage por la studentoj).

Studhoraro : Malfermo : 10h00. Studo ekde 10h30. Komuna tagmanĝo : 13h00.  
Plia studo : 14h15. Konkludo : 16h30. Oficiala fermo : 17h30.

Surloke aĉeteblas libroj novaj kaj brokantaj.

Por aliĝi aŭ ricevi disdoneblajn informilojn kontaktu Nancy Fontannaz, ĉu rete : [nancy.fontannaz@gmail.com](mailto:nancy.fontannaz@gmail.com) , ĉu telefone : 021 728 31 27 (kun respondilo) neforgesante indiki viajn nomon kaj adreson.



# Kongresen

## **Svisa Feria Esperanta Renkontiĝo = SFERO**

**Le Louverain super Les Geneveys-sur-Coffrane (Neŭŝatela Ĵuraso)**

Nuntempe la esperanto-renkontiĝo plej grava en Svislando, tio estas SFERO, venigas eksterlandanojn, kiuj ĝuas la esperanto-etoson ĉe ni. Kutimas veni familioj svisaj, unu el Alemanio kaj du el Romandio, kaj familioj el norda Germanio kaj najbara Francio. Ĉijare entute 11 infanoj de diversaj aĝoj kune ludis, promenis, babilis, muzikumis. Mirinda momento kvieta, homa, ripoziga, fruktodona por ĉiuj (Vidu

ambaŭ kolorajn fotojn sur la malantaŭa kovrilpaĝo).

Meze de oktobro ni estis bonŝancaj kun mirinde bela vetero, kiu ebligis la admiron al Alparo el la bela domo Le Louverain, nesto flanke de la monto je mil metroj super la marnivelo.

Plie samtempe okazis sub la sama tegmento kunveno de la programo Grundtvig. Membroj de 3 aliaj landaj asocioj venis al Svislando : el

Katalunio, Francio kaj Germanio, entute proksimume 20 personoj.



Anstataŭ la kutima kolektiva sin-prezentado, la partoprenantoj devis duope konatiĝi en vidalvida babilado, kaj poste unu devis prezenti la alian.



Ĉiuj tre ŝatis tiun farmanieron.



Kadre de tiu programo subtenita de Eŭropa Unio ni esploras en Esperanto rimedojn por interkultura edukado, defio por Eŭropo. La

celpubliko de niaj pripensoj estas plenkreskuloj.

La kantono Neŭŝatelo estas tre aktiva en prizorgado de harmonia kunvivado inter lokanoj kaj enmigrintoj ; pro tio ni venigis fakulon kaj ni povis aŭskulti lin, s-ron Jean-Claude Perrin, respondeculon de tiu kantona programo fariĝinta modelo por tuta Svislando. La sciovolemo de niaj gastoj estis grandega, demandoj abundis, debato viglis.

Niaj eksterlandaj gastoj povis viziti la urbon Neŭŝatelo.



*Dum la vizito de Neuchâtel*

Pri nia laboro kadre de la eŭropa programo Grundtvig : vidu [www.noos.ch/ideo](http://www.noos.ch/ideo). Entute ĉeestis proksimume 50 personoj.

La loka televid-entrepreno Canal Alpha sendis ĵurnalistinon, kiu filmis dum pli ol cent minutoj. La rezulto estas tre bona okminuta elsendo MINIMAG. Oni povas vidi ĝin sur la retpaĝo [www.esperanto.ch/sfero](http://www.esperanto.ch/sfero)

Mireille Grosjean.

-oOo-

# *Kulturaj paĝoj*

---

Redaktas : Richard Schneller (rs), Rue Charles-Knapp 20,  
2000 Neuchâtel, rischneller(ĉe)gmail.com.

Pri la enhavo kaj la stilo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

---

## **Impresoj kaj esploroj pri la romano *Kiel akvo de l' rivero* de Raymond Schwartz**

(2a parto)

*Dua parto de prelego de  
Christoph Klawe  
dum la festado de la 125-a jariĝo  
de esperanto en CDELI  
(1-an de septembro 2012)*



### ***Kiel akvo de l' rivero :***

#### **Enhavo – 2a parto**

1913 / 1914 :

En Berlino, Pierre Touchard loĝas ĉe la familio Geist, domo 102, Bülow-strato.

La geedzoj Geist havas du infanojn preskaŭ samaĝajn kiel Pierre : Hugo kaj Lotte.

Lotte ofte invitas tri amikinojn, inter ili ankaŭ iun Annemarie Balkenwirth.

Pierre trovas multajn inspirajn amikojn kaj lernas pri strangaj germanaj kutimoj kiel studentaj drinkkunsidoj kun bierdueloj kaj la bierkunvenoj de pli maljunaj sinjoroj.

Pierre ŝatas ripozi kaj revii sur benko de la Lützow-placo meze de Berlino.

Pli kaj pli li sentas fortan korinklinon al Annemarie, sed ĉiu alproksimiĝo estas malhelpata per diversaj malfavoraj cirkonstancoj.

Subite la unua mondmilito eksplodas, kaj multaj ŝajnaj amikoj malas.

Pierre devas forlasi la familion Geist.



Ĉar civilaj trajnoj ne plu veturas al Metz, li senhejme vagumas tra Berlino.

Lastfoje li vizitas la Lützow-placon, Annemarie atendas lin tie – jam de longe ankaŭ ŝi amis lin, kaj ofertas loĝejon ĉe si. Ili kune pasigas nur malmultajn feliĉajn tagojn ĝis Pierre povas, aŭ pli bone devas, preni trajnon hejmen.

Pierre atingas Chanzy, sed la limo nun estas strikte gardita.

Nokte li kaŝas sin en la arbustaĵo apud la bordo de la rivereto Seille.

Finfine li ree eniras sian patrujon.

Fakte, miaj esploroj pri « Kiel akvo de l' rivero » laŭ kronologio komenciĝis en Berlino. Ĵus post finlegado de la romano, mi vizitis medicinan kongreson en Berlino. Studante la mapon en mia hotelo, mi rimarkis, ke mi estas proksime al Bülow-strato kaj Lützow-placo. Do mi deziris vidi, kiel la supozita domo de la familio Geist kaj la ŝatata ripozejo de Pierre Touchard vere aspektus. Mi sekve decidis preterlasi la tagmanĝon kaj dungis taksion. La taksisto estis tipe berlina, turkdevena ŝoforo. Mi petis lin veturigi min unue al Bülow-strato 102, poste al la Lützow-placo. Mi povis klare vidi, ke li miras. Ambaŭ ejoj ne estas kutimaj turismaj celoj... Mi elsaltis, rapide pafis fotojn kaj reensaltis en la taksion. Nun mi miris, kion pensus la senmovmiena ŝoforo – ĉu li supozus, ke mi estus profesia krimulo, kiu kaŝobservus ejojn de estontaj krimfaroj? Mi sentis min urĝita ekspliki – kaj li konfesis, ke vere li miris... Do mi rakontis pri Raymond Schwartz, « Kiel akvo de l' rivero », kortuŝanta amhistorio kaj Esperanto, pri kiu lasta li neniam aŭdis antaŭe. Sed la ideon de Esperanto mia ŝoforo ege aprobis, kaj li promesis legi pri ĝi en la interreto.

La adreso Bülow-strato 102 ankoraŭ hodiaŭ vere ekzistas. La romano priskribas, ke la loĝejo de la familio Geist estis situinta en la dua etaĝo.



Laŭ la arkitekturo de la domo estas facile imageble, ke ĝi estis konstruita en la tiel nomita « Gründerzeit », la « fondintepoko », do verŝajne jam staris en la jaro 1914.

Ĉu Raymond Schwartz nur hazarde kreis la adreson de la domo de la familio Geist, aŭ ĉu li fakte pensis pri tiu speciala domo, ĉu li eĉ persone konis ĝin, estis iamaniere ligita kun tiu domo ? Tion ni ne ekzakte scias, sed el la romano ni akiras aliajn interesajn, pli detalajn informojn pri la domo :

Paĝo 115 :

« Ne estis enirejo senpere de la strato, sed oni devis paŝi unue trans la sojlon de l' domo por trovi, sur unu flanko de tiu kvazaŭvestiblo, la ŝtuparon al la butikoj. »

Kaj tiu priskribo tre bone similas al la vera domo Bülow-strato 102 en la hodiaŭa Berlino. Se oni bone alrigardas la eniron de la domo, oni fakte vidas « kvazaŭvestiblon » kaj dekstre hodiaŭ formurigitan, iaman pordon – eble la pordon al la ŝtuparo, kiu gvidis en la subteretaĝan butikon.



Kaj tiu simileco inter la vera domo kaj la domo de la romano povas esti indiko, ke Raymond Schwartz vere konis tiun specialan domon.

Berlino, la germana ĉefurbo, havas tre aktivan Esperanto-asocion, sed ankaŭ ĉe Bülow-strato 102 nenia ŝildo atentigas la preterpasanton, ke la domo ludas gravan rolon en unika verko de la mondliteraturo. Verŝajne ankaŭ ĉi tie kaj la komunumo kaj la posedanto de la domo scias nenion pri ĝi.



En la romano ankaŭ la adreso de Annemarie Balkenwirth estas menciita : « Hohenstaufen-Strasse 118, Berlin-Schöneberg ». Tre bedaŭrinde do, hodiaŭ domo kun tiu numero ne plu estas trovebla, ĉar dum la tempo de la « malvarma milito » la Hohenstaufen-strato estis distranĉita per la berlina muro kaj oriente de la muro, kie ankaŭ la numero 118 troviĝis, la strato estis renomita kun nova domnumerado.

Pri Lützow-placo ni legas :

Paĝo 243 :

« Malfrue, posttagmeze, nur por eliri el sia zumanta penso-karuselo, Hugo faris kun Pierre kelkajn paŝojn tra la najbaraĵo. Sen entuziasmo. Sen celo, sen deziro. Ĉe la Lützow-placo ili vidis iom da verdaĵo, iom da izolo. Pierre konis la lokon kaj proponis al Hugo : < Venu, ni sidiĝos iom sur mia benko. > < Ĉu benko tie ĉi ? > < Jes, eĉ du ! Mi malkovris ilin antaŭ nelonge... Tie, kaŝite inter la arbustoj. Ideala loko por milda revanto. For de l' grandurba trafiko. > »

Paĝo 283 :

« Jes, transflanke, ne malproksime, estas la Lützow-placo, kun sia ĝardeneta boskaĵo. Tie, inter verdaĵoj, lia benko... Li iris adiaŭ-diri al sia amata benko. »

Se oni vidas la placon hodiaŭ, oni havas la fortan impreson, ke ĝi perdis sian ĉarmon ekde la tagoj antaŭ la unua mondmilito. La placo estas ĉirkaŭita per grandaj stratoj kun brua trafiko.



Staras benkoj tie, sed certe ne la historiaj.





Alrigardante malnovan foton, oni povas multe pli bone diveni, ke en tiuj tagoj la placo proponis belajn ripozejojn.

(Tria parto en la venonta numero de SES informas.)

## ***La infana raso de William Auld***

**(2a parto kaj fino)**

*Dua parto de prelego de  
Dominique de Mestral  
dum la festado de la 125-a jariĝo  
de esperanto en CDELI  
(1-an de septembro 2012)*



- 8** Fino de la tera vivo far la plej alta punkto de la evoluo : la homo !  
Ni forgesu atomdanĝerojn, ni ĝuu la vivon senzorge. Nur kiam ni  
rememoros estos tro malfrue !

*mi forgasas pri l' fumokakto de hiroŝima  
mi deziras nur okupon virinon distron  
lernas nur hazarde, forgasas multon,  
elektas nur la facilan*

*kaj oportunan  
kiun aliaj elektas por mia informo  
sed ne hezitas decidi, juĝi, kondamni  
se tion la cirkonstancoj trudas devige  
Mi estas antaŭ ĉio prudenta.  
kiam la plando giganta  
kaŝos nigre ĉielon  
tiam mi rememoros  
sed tro malfrue*

[...]

*En la fina freneza horo  
kiam mamojn ŝiras vitreroj  
kiam traboj oferas al Fajro  
kiam vermoj ekrampas  
mi estas la mondo Nur mian cerbon turmentas  
la suna disŝiro de nervoj  
kiam morto fermas  
al mi la okulojn  
la mondo mortas  
sed la celo*

*daŭras*

*kaj lagoj lekas frapete la ombrajn bordojn*

*kaj ne ekzistas se mankas oreloj homaj*

*la peza pulso de akvo  
frido  
senmovo  
sed blinda celo*

## 9 Citaĵo :

*« Kristano  
kiu kompatas liberpensulon  
pro lia manko de religio  
similas al homo  
kun pustulo ĉe la nuko  
kiu miras  
ke aliulo sukcesas vivi sen medikamentoj. »*

- 11 « Ho, saluton filaĵo... », stranga maniero saluti novnaskitan filon, ĉu ?  
Ĉu ni vere estas senrimedaj rilate al gefiloj ?

*Ŝia utero montras burĝonon : ho, saluton  
filaĵo ! Nia raso bezonu ĉi rekruton !*

[...]

*Blinde ni kreis vin en momento de ekstazo  
(de nia praamebo ĝis vi – sekundopaso)  
kaj blinde vi pluiros, la sklavo de la celo,  
al nekoneblaj faroj, servuto aŭ ribelo.  
Vi kredos propran kredon, katenojn proprajn forĝos,  
kaj propramaniere ĉi stranga mond' vin sorĉos.*

[...]

*Mi uzas ĉi okazon por mian cerbon dragi –  
laŭ sperto de la patro neniu volas agi ;  
neniu patro rajtas dekreti al la filo,  
sed ĉiu patro devas helpeti per konsilo :  
jen la problem' duobla, kiu min ekkoncernas.  
Kiom individuo de l' antaŭuloj lernas ?*

Kaj al filo :

*En kia mond' vi vivos ? — mi ĝin neniam konos,  
kaj trans barilo tempa al vi mi lecionos,  
vane aŭ mise ; vin klopodante gvidi save,  
mi povos misdirekti, admoni vin malprave.*

[...]

*Pardonu min, filaĵo. Mi estas senrimeda,  
senvorta kaj senscia, kaj, mi suspektas, teda ;  
venu, kaj mi vin amos, vin ŝirmos se mi povos,  
ĝis vi la propran vojon en propra mondo trovos.*

- 12 Auld priskribas militon kaj primokas la kredon, ke miloj da homoj ne iras  
en la ĉielon, simple ĉar mankas la ĝustaj ritoj !

